

Johann Wolfgang von Goethe,

## Majkanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Belege brilas  
Natur' kaj sun',  
Kaj ĉio ridas  
Ĉirkauŝe nun.

Eliĝas floroj  
El ĉiu plant',  
El arbustaĵo  
Milvoĉa kant'

Kaj ĉiuj sentas  
Feliĉon nur.  
Ho ter', ho suno!  
Ho ĝoj', ho plezur'!

Ho am', ho amo!  
Ja kiel or'  
Vi estas bela,  
Kaj kiel aŭror'!

La freŝan kampon  
Benegas vi,  
La plena mondo,  
Floregas ĝi.

...

Knabin', ho knabino,  
Mi amas vin!  
Vi min rigardas  
Kaj amas min.

Alaŭda kanto  
En la aer',  
Ĉiele odoras  
La tuta ter'.

Ho kiel varme  
Mi amas vin,  
Vi min ĝojigas,  
Ho junulin'!

Kuraĝon vi donas  
Al nova kant',  
Feliĉa deziras  
Vin via amant'!

*Traduko de la Germana poemo "Mailied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1994.*

*MR-22-2 / Arg-261-526 (2004-09-06 05:48:22)*